


PENSEO

N-ro 347


sept. / 2020

Monata Beletra Revueto en Esperanto

Honorita de Premio Grabowski,1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 31-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Gafur Mirzo (Uzbekio)



Ho, Homaro!

(aŭ invito al medito)

Ho, HOMARO! Vivante mi
kun Vi multegon vidis
Deduktante ĉion, al Vi
ion diri decidis!

Aŭskultu min Vi, kara
kaj atentu je la tem',
Dediĉitan al Vi ĉiuj
kaj ankaŭ al mi mem.

Mi ne bezonas la gloron,
Laŭdvortojn, titolon.
Mi nur volas diskonigi
Vaste mian korvolon!

Mi ne mesaĝas al unu
ajna popol' aŭ car'.
Mi mesaĝas al Vi ĉiuj
tiel nomata Homar'!

Oni nomas nin "La Homo" –
plej saĝa sur la Ter',
Senĉese ni devas beni
tio estas pura ver'.

Unu el ni estas judo
Kaj alia islaman',
Kaj jen, la tria kristano
Sed la sama koro, man'.

Ĉiuj havas la komunajn
Estintulojn iamajn,
Kaj la saman ja lulkorbon
Kaj la gepatrojn samajn.

Ĉiuj kunagnoskas certe
Tiujn Adamon, Evon,
Sed militas inter si mem
Forgesinte ĉefdevon!

Mia celo: tiun devon
Al HOMAR' memorigi!
Kaj cetera celo estas:
Malamon tutforigi!
...
Meditu, Vi ĉekomence
estis akvo etguta,
Sekve, post eta karnaĵo
fariĝis Homo tuta!

Dio donis ĉion-ĉion
kion Vi ja bezonas.
Ĉu dankeme ĉion-ĉi Vi
iufoje rezonas?!

Iutempe senerare
Vi iradas survoje,
Ekvidante ĉion rektan
perdas vojon fojfoje.

Kaj multfoje, kara Viaj
aferoj ne malbonas,
Sed senĉese multaj el Vi
fieras, fanfaronas!

El Vi mem estas sklavoj,
kaj ankaŭ regantoj.
El Vi estas mizeruloj,
kaj el Vi estas dantoj!

El Vi mem estas murdito,
kaj mortinto el Vi mem,
El Vi estas foriginto
el Vi kiu plantas sem'.

Memorigi volas mi Vin
ĉimomente ĝi endas!
La pendanto estas Vi mem
kaj el Vi kiu pendas!

Vi gardito, kaj gardinto
vestinta unuformon.
Vi denuncas, kaj ankaŭ
atendas la informon.

Jen, pri Via Homa eco
ankoraŭ unu noto:
Vi mem estas subpremito
Vi mem estas dispoto.

Kiu estas ekbatinta,
falinta estas kiu?
Kaj ambaŭ estas Homo
Via an' estas ĉiu.

Nur kelkaj vivas bombaste
Milionoj malsatas
Pro la tiaj maljustoj Vin
senĉesaj plagoj gvatas!

Forgesinte la Sekvon, Vi
ĝis kiam ĝojos, festos?
Meditu, la heredaĵo
al kiu ido restos?

Ho, HOMARO! Ĝis kiam Vi

daŭrigas ĉi-ĉion?
Vi forgesis sian Devon
Vi forgesis la Dion!!!
...
Ĉiupaŝe, ĉiutage
la Dio mem nin gardu!
Venu kaj ni kune Vian
pasintecon rigardu!

Trapasis... kun la bruoj
ho, kiom da jarcentoj
Trafluis kiom da akvoj
kaj kiom da la ventoj...

En histori', ĉiu jarcent'
la militoj ja svarmis
La prauloj Viaj ĉiuj
sin armis kaj sin armis!

Diversspecajn armilaron
elpensis la genioj
Por forigi la gentaron
Fariĝis inĝenioj.

Vi senĉese inventis kaj
kreis dum jarmiloj
Aperis novaj, diversaj
kaj mirindaj armiloj.

Ekaj iloj el la ŝtonoj
Multajn multgapigis
Iom postaj akraj iloj
Multajn senkapigis.

Iom poste Vi ekvolis
armilojn pli fortigi
Ĉefa celo de l' armiloj
estis nur: hommortigi!

Poste "saĝaj" en citiloj
elpensis meĉfusilojn
Ĝi bonegplenumis taskon
pereigis la milojn!

Sed vi ne povis atingi
kun ĝi grandegajn celojn.
Maltaŭgis ĝi por detrui,
ekfaligi kastelojn.

Por plenumi tiun planon
por plibonigi fonon
Vi elpensis bizarilon
akuttonan kanonon!

Obeinte Vi la estrojn
ordonsimildirantajn
Vi inĝenis pli fortan
armilojn memirantajn.

Memiranta ilo "Tanko"
pafis bone frapante
Tio signifis: inventon
Vi jam faris ne vante!

Urĝis afer' kaj aperis
flugante pafantoj
Por Vi iliaj bruadoj
sonoris kiel kantoj!

Por bombardi grandskale
por malproksimen ĝetoj
Troviĝis kun flugil' kaj
senflugilaj raketoj.

Hej, Vi haltu! Alikaze
Dio mem Vin malbenos!
Tuj perdinte ĉion Vi en
Ĉefjuĝeĵon revenos!

Se okazos la mondfino,
tutmonda ĉefelpelo
Disfendite viaj iloj
disflugos kiel ŝelo!

Ĉiu tia inventado —
unu paŝ' al pereo
Dum pereo Vin ne helpos
Via pet', via veo!

Ĉu la celo de armiloj
Ĉasi lepor', anason?!
Ĝia ĉefa celo estas:
forigi homamason!

Maltaŭgas Viaj iloj
se venos Diplago!
Kion diros kaj respondos
Vi en tiu puntago?!
...
Kelkaj el Vi senhoneste
Diecon pretendis
Por konkeri tutan Teron
la svingon etendis.

Pro l' militoj elpensitaj
kaj maldecaj memvoloj
Malaperis sur la Tero
multaj landoj, popoloj

En Via longhistorio
la militoj plen-plenas
Ne forgesu ke en finon
Vi rapide alvenas.
...
Sciante ĉion-ĉi ja
pekaj Viaj daŭras
Doninte al Vi la grundon
la Tero bedaŭras!

Kiam Vi turmentas Teron,
Ĝian korpon premas
Ne toleras Ĝi doloron
kaj nevole ektremas.

Kiam ekas malsimpati',
ekas Ĝia kolero
Komenciĝas kataklismoj
kaj plagoj sur Tero!

Poste ploros la Ĉielo
tuj Vin abomenante
Verŝas siajn okullarmojn

ne plu ja eltenante!

Kiam ekkoleras ili
en tiuj malheltagoj
Perdos Vi sian trankvilon
Vin superŝutas plagoj!

Mi ne volas timigi Vin
kaj ne volas tumulton,
Mi nur volas al Vi Pacon
dirante tiel multon!

Kiel Via veramiko
mia ĉefa cel' nura
Averti: ke proksimiĝas
io komunterura!

Pro via maldecagado
aro de plag' venas
Sur la Ter' ĉiu estaĵo
kune Vin abomenas!

Sur la Tero diversloke
ja terure torentas
En alia regiono
pli impetege ventas!

En alia angul' de l' Ter'
permanente inundas
Aliloke hom' memvole
unu alian vundas!

Ĉe marbordoj cunambatas
Aliloke tornadas,
Mi ne vidas pacan lokon
ĉie io invadas!

La Homaron ĉie io
senĉese forte batas
Iuloke iu festas
aliloke malsatas.

Ĉiutage en la Mondo
iuj senfine veas!
Amasmortas tutaj gentoj
kaj sennombre pereas!

Malaperas ĉefnutraĵo —
mankas freŝaero!
Malpuriĝas Via Korto,
Via lulkorbo — Tero!

Travideblan, puran akvon
la maroj mem bezonas
Ankaŭ maranimaloj plu
tian akvon ne konas.

Ne miru! Mia verkaĵo
ĉio-ĉi pure veras
La estaĵoj de la Mondo
pereas, malaperas!

Ĉiuflanke Vin ĉirkaŭas
senĉese la kulpondo
Jen rezulto: suferas Vi
kaj suferas tutmondo!

Lastjarcente Vi sur kolon
pezan pekon alligis
Disvundinte tutan Teron
Kosmon maltrankviligis.

Jen demando al vi de mi,
demando de la verso:
Kion faras Vi kaj kion
serĉas en Universo?

Jen al Vi ĉefdemando kaj
jen al vi tutmondvoko:
Ĉu jam mankas por Via gent'
sur la Tero loĝloko?

Sed Vi lasu la Universon
tuj ĉefhejmen revenu!
Doni trankvilvivon al Ĝi
la Kosmon ne plu ĝenu!

Se forgesis Vi, mi al Vi
memorigas la Veron
Venos tempo kaj Vi nepre
revenos en ĉi-Teron!

Ŝainas multaj el Vi tute
forgesis sian memon
Kiam plibonigos Vin mem,
plantas boncelsemon?!

HO, HOMARO! Pro l' aferoj
ĉu Vi ne sentas lacon?
Ĉe la fino mi deziras
Al Vi Pacon, nur Pacon!



Rita Mkrtchyan (Armenio)



Belegaj rozoj

Belegaj rozoj kreskas en ĝardeno,
Ektuŝi timas, nur admiras mi
Kaj ŝajnas, ke susuras la petaloj,
Aŭdeblas tre kviete ama melodi'.
Nur rozoj povas kanti tre tenere,
Fieraj, ĉarmaj dum " parolo" kaj " silent' ",
Kaj se donacas rozojn, estas komprenebla
Plej bela en la vivo, ama sent'.
Ĉu lasi rozojn kreski en ĝardeno?
Ne eblas sin deteni ofte mi,

Kaj la belec' ornamas mian ĉambron
La ĝojo kiel interŝanĝ' de flora viv'.



HANS-GEORG KAISER (Germanio)




REVILOJ

Min logas ĉiuj mevoj,
ne tentas tro la devoj.
La mevoj estas revoj,
aŭ iloj por sinlevoj.

Senrevon mi ne ŝatas,
al devviktim' ne fratas.
Mi tiun nur kompatas,
ne realistojn flatas.

Ĉu estas ni nur iloj
de iuj mezuriloj?
Min logas pli reviloj,
revigaj malciviloj.



PS: Mi ĝuste verkis la poemon, pensante pri la karikaturo sendita de Svetlana Konjaŝova. Maldekstre atendas vin revoj, dekstre devoj. Sed certe nur ŝajne, en vero realoj sen revoj, kaj devoj sen revoj estas eĉ malpli ol devoj aŭ revoj. Nur la revoj faras eltenebla la realan mondon kaj instigas la homojn plibonigi sin mem kaj la realecon. Kaj la revoj helpas realigi strebindan realecon. Revo estas la plano de la abelo, kiun ĝi havas en la kapo, antaŭ ol ĝi konstruas sian domon. Do la revo estas ĉiam parto de la realeco, dialektika partnero de la realeco.

Papos Nascentes (Brazilo)



SUKERAĴOJ DE AVINJO

ĉu amindumi stelojn de maja ĉielo min helpas
travivi arĥetipojn?
ĉu senti sin ravita, ensorĉita eĉ de la malpli
brila igas min pli bona?
stelo, tiom... fora. diras mi ne pri platona amo
eĉ se arĥetipojn simboligi!
diras mi (faluso ĉu?) pri seks-ardo, fando, unio
inter mi
kaj la steleto de kiu estas mi ravita!
kiu eksplicas ekstazon, ekamon, ravitecon?
mi, ne! sed, sentas mi ion sekretan pri tiu stelo
– suspektas mi:
certe ankaŭ ŝi min vidas specialan
en kiu dimensio estas ni steloj: briloj lumoj
kondensitaj?
por tute freneziĝi, kaj se ĉiuj amikoj,
amikinoj,
filoj, nepoj, kolegoj, kontraŭuloj estu steloj?
ĉu lumoj kaj koloroj kaj briloj, kiu scias?
ĉar Avinjo min diris pri amiko – mi infano:
ne! Niltiĉjo ne mortis! iĝis li stelo!
kion Avinjo sciis, volis min riveli, kiun ĝis
nun ne lernis mi?!
ĉu amindumi stelojn estas frandi amon, belon,
veron, justicon,
abundon, tuton, plenon? Ne mi scias!
sed, kontempli la amatan stelon igas min
suspekti
kio estu pleneco: tio multe similas al l' gusteto
de l' sukeraĵoj de Avinjo! ĉu vi min
komprenas?

POEZIO JEN CIVILA MALOBEO

al amiko poeto Paulo Viana


botanikoj ne aŭdacus
plej malpli entomologoj:
la nova speco de floro
kun sia parfumo senmezura
la insekto ĵus katalogata

kun malkontinuaj antenoj
estis unue priskribitaj
en la verda antologio ekzakta

poetoj pro akraj aŭdacoj
celebras la burĝonon de malico
en la frida maten' de dista suno
la koloroj ĝentilecojn surprizigas
la insekto sur ĝi sidis antenoj seriozaj
atentaj krudaj sed ne furiozaj
de agresaj zumadoj naldikaj himnoj
malagordaj malĝentilaj amatoraj

kiel amantoj de ĉiam kaj antaŭe
dancas la floro malico kaj insulto
(la insekto serioza sur mildaj petaloj
de malico) – la raŭka voĉo de la vento
tiel frida obstinita griza
kuŝas metaforoj sur grundo de poezioj
ornamaj floroj de antologioj...

Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)



La maro

Impreso al Galena

Ili iradis duope. Vojeto malseka. Kruroj dronas.
Manoj varmaj. Lipoj humidaj. Hararo disĵetita.
Rideto karesas. Okuloj verdaj. Voĉo en la silento.
La maro blua. Ondoj inundas. Sala la akvo.
Suno malantaŭ nubo. Subiro alvenas. La bordo dezertas.
La senfino lazuras. Profundas la maro. Ŝipoj navigas.
Mevoj traflugas. Fiŝetoj saltetas. Rido naskiĝasas.
Nimfoj dancas. Kanto ama. Sablo odoras.
La lipoj ardas. Senbruas la emociio. Malĝojo forflugas
Luna rideto. Unuigitaj la korpoj. Batas la koro.
La papilioj flirtas. La animo festenas. Ardas la korpoj
Vortoj senvoĉaj. La fino senvoĉa. La vivo mallonga.
La amo eternal



Razgrad, Bulgario, Europo

Blazio Vaha (Hungario)




Ambicieto

Iam volas mi tro multe
poste volas mi malmulte,
morgaŭ volos c i ja ĉion
mi, postmorgaŭ jam: nenion.
Jes c i volas preskaŭ ĉion
preskaŭ volas m i nenion
havi sed ja scii volus
pli se lerni pli mi povus.
Nun eĉ scii mi ne volus
ion novan, aĥ se povus
nur kompreni tion, kion
ĉirkaŭ mi mi vidas, i o m.

Versetoj liberaj

Ĵus salutis mi cin.
Ne salutis ci min.
Ĉu ci min koleras?
Tion mi toleras.
Vi kelkaj ne miru,
Ni libere spiru.
Ŝparu ni kolerojn!
Ni kolektu berojn.

Iskouhi Avetiqian (Francio)




Ŝanĝiĝo de pensmanier'

Ne timu futuron, eĉ ĝin neniu konas,

Pripensu nur pri sunaj tagoj alvenontaj;
Ne haltu por paroli, kiam vi malfartas,
Ridetu sentime kun belparoloj dirontaj.
Akceptu la vivon, kiel belsonan muzikon,
Iam simfonian orkestron aŭkultante;
Ŝanĝu kelkfoje kun ritmo laŭ via vivo,
Sen forgesi sub gajan notojn dancante.
Ĉar la mort' alvenus sen vin demandinte
Tutegale ĝi neniam lasas la invitilon,
Pli bone kaptu l'agrablan momenton,
Por daŭrigi l'amon kun feliĉ' vivonte.

17/08/2020

Siranush SLAGMULDER (Francio)



Rekordatorio al viruso

O !

Rifuzante transformiĝi marioneton,
Kiun oni dezirus dancigi por spekti,
Jam, en la sceno, antaŭen skribinte,
Esti senvoĉe, kaptinte, kiel vera best'
Ne! Dankon, neniu povus devigi nin!
Perforte, servi viajn malhelajn fortojn,
Senutile! Ne elspezu montojn da mono
Ĉar la mono estas nur rubaĵo de la man'
Eĉ se vi scipovas detrui homajn rajtojn
Ni estus solidaj! neniu povus timigi nin!
Ne forgesu! Via ĝojec' ne daŭrus longtempe,
Por gardi kaj sufoki la homaron en via kaptilo,
Oni tranĉus kaj rompus viajn ferajn barilojn,
Dorse kun dors' por Liberec', ekstarus ĉiuj
kune ,
Memoru! vi neniam kapablus mortigi nin!
Fidu! Ni nepre elirus el malhelec' tre baldaŭ
Lum' alvenus kun Esper' sen malfruiĝi
neniam!

28/08/2020

Siv Burell (Svedio)



Senzorga dom-mastrino

La simpla ĉiutaga viv'
al mi plej preferindas
sed foje ankaŭ mi
pensas ke festindas

Sed festo estu aranĝita
sen tro da granda pen'
pri tradici' zorgita
neniu volas pli da ĝen' .

Ne streĉo je Kristnask' ekzistas
kaj Novjaro reas ĉiun jaron
do ĉiam mi malstreĉas,
dum festotagoj en parad'
paŝas kaj forpasas


Ĉuisto (Ĉinio)



Promenado sur l' antikva ponto

mi promenis sur l' antikva ponto en printempo
miaj paŝoj vekis rememorojn
pri suferoj miaj en juneco
ĉi tie estas la fonto de mia vivo
—rememoroj kun morozo kaj belaj misoj
l' antikva ponto kuŝas en silento
super la fluanta rojo
kun ĝojo ĝi volas vidi
pasantojn iri kaj reiri kverante en zefiro
kaj lasante spurojn sur ĝi
geamantoj staras man-en-mane sur la ponto
jen ĉarma foto kun bela pejzaĝo
ho, antikva ponto
vi atestis momentan pasinton
kaj restigas al vi rememoron de la tuta vivo

Elena Popova (Bulgario)



Ĝi violonas
nokte en la orkestro.
La majstro Grilo.

La formikoj
laboradas senlace.
Ne ĉiuj homoj.

Matura grenkamp'
atendas rikoltistojn.
Nur birdoj kantas.

Sendormaj noktoj
pro la granda ardeco.
Decas al Aŭgust'.


La lumo estas
vekiĝo per kareso.
Maten' elkantas.

István Fekete (1900 – 1970)

Adiaŭo


Foriros poiom bosko, arbaro,
For kanejo, vintro, somer',
Monto kaj valo, tago kaj nokto,
Okulvidata ĉirkaŭo.
Ĉu foriros? Eble ne tute,
Eble mi revidos sur la eterna akvo,
Ja Beleco estas mem la Dio,
Kaj en animo ĉeestos: mi kredas, kredas.

Elhungarigis:



Lenke Szász (hungario)

Mimoza Ahmeti



Kiel daŭrigo

1

Kiel daŭrigo mi aperis en la mondo
Ne konsciante pri la momenteto de mia
naskiĝo
Iam ajn la plenan mortotagon ne sciante
Kiel daŭrigo mi enverŝas en la mondo
Kiel daŭrigo mi eniris ĉe vi kun amoro.

2

- Ĉu vi amas min?- demandis mi-
En la momenteto de la ĝojo
- Ekde la mangestoj- vi diris-
Ĝis tiu de la penso.

3

La mondo trans la fenestro
Maltranse mi.
Sed ne dividas nin la fenestrokornico.

4

La paco povas esti
Neniam PACO
Ĝiskiam ĝi pretigas
La militan sangon.

5

Ni jam ellernis,
Post provoj ni ellernis:
Neniam la rezistado alportas solecon,
Ne estas amo ĉiu kareso.

7

Ni la amatojn igas
Aperigi tiujn aspektojn
Kiujn ili tiom bele posedas
Ne sciante.

8.

Per paroloj antikvaj kiom la homaro
Mi volas diri kozojn tute novajn
Pensojn ne aŭditajn alifoje
Dum kiam ni ne intervidiĝis, ili akumuliĝis.

9

Mi estas plenigita kvazaŭ la ujo pintpinte
Mi estas plenigita kvazaŭ maro dum alfluo
Mi estas plenigita kaj apenaŭ enverŝiĝas,
Pro la homa demando por agado.

10

Apenaŭ povas superakviĝi la rivero
Kontraŭ la ties lito,
Ekkantos do la poeto
Kontraŭ ties sentimento.

Elalbanigis



Bardhyl Senimi (Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Su Shi (1037-1101)

—laŭ melodio de *Subigo de ŝtormo*

Je la sepa de la tria monato laŭ lunkalendaro ni trafis pluvon sur la vojo. Sen kontraŭpluviloj la kunirantoj falis en embarason, sed mi ne havis tian senton. Post momento la ĉielo sereniĝis. Pro tio mi faris la jenan poemon.

Ignoru la sonojn de l’ pluvo frapanta
foliojn de arboj susure.
Ni kantu kaj longe kriadu
aplombe lantpaŝe plezure.
Bambua ir-stango kaj herbaj sandaloj
pli taŭgas ja ol rajd-ĉevalo,
ne timu, iradu en pluva vualo.
Eĉ kun pajla pluvmantelo
ni povas vivadi dumvive
en ŝtorma vetero.

Frideta la vento sobrigis
min el vinebrio.
Mi sentis frosttremon,
sed mi ja kun sobra racio
renkonte al la sunradioj
oblikve ĵetitaj en strioj.
Kiam mi retrurnis la kapon
kaj vidis la lokon, kun scio,
frapitan de pluv’, facilpaŝe
reiras mi hejmen sen ajna konscio,
ĉu pluvas torente
aŭ hele serenas kun sunlumvario.

Sur abrikotarbo

—laŭ melodio *Papilio super floro*

Sur abrikotarbo
velkas ruĝaj florpetaloj,
pendas nur junverdaj drupoj etaj.
Jen hirundoj flugas nun en paroj
tra l’ ĉiel’ libere.
Ĉirkaŭ la vilaĝkabanoj en montvaloj
lirle fluas verda rojo.
Sur salikoj flokoj pro flirtfaloj
malpliiĝas tag’ post tago.
Bonodoraj herboj ja en jovialoj
kreskas ĉie tra la tero —
en printempaj la finaloj.

Trans la ĉirkaŭmuro
nun knabin’ sin svingas per pendolo
eligante ridosonojn elen,
kaj pasantoj jen aŭskultas kun bonvolo.
Poste la ridad’ malrapide
kaj homvoĉ’ knabina
malaperas tuje kun petolo.
L’ aŭskultantoj falas en malplenon,
kvazaŭ ili ĉagreniĝus pro la folo
ŝerca kaj profunde deprimiĝus
ja sentimentale sen konsolo.

Al amiko

—laŭ melodio *Ok taktoj de Ganzhou-kanto*

Sentplene vent’ alpuŝas tajdon
de dek mil lioj fore,
sed ĝin forsendas senkompate.
Kiomfoje ni ambaŭ laŭmemore
jen spekte ĝuis sunsubiran lumon
ĉe l’ bordo, vesperhore,
de Qiantangjiang-rivero?
Ne zorgu pri l’ ŝanĝiĝoj ja esplore
de nuno kaj antikvo, ĉar dum momenteto
la mondo tuj fariĝas sensonore
alia fiziolomi’ tutnova.
Neniu ja similas kontraŭvole
al mi grizaharulo, kiu jam rezignis
pri promocia ŝanco malmolkole.

Memoru pri l’ uestra bordo
de l’ Okcidenta Lago, kie bela
pejzaĝo de l’ printempo plenas:
junverdo okulplaĉa en vakuo hela
kaj pluvnebulo fumvuala.
Ni ambaŭ ja kun kor’sincera
rilatas unu la alian.

En rond’ de l’ poezio sfera
la homoj kiel ni tre raras.
Ni fiksu l’ daton laŭ la flu’ rivera
veturi orienten por la ermitiĝo
sen rompi kun promes’ fidela.
Dumvoje ni ne devos turni kapon
nek penti en larmad’ sufera.

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Jiao Ran (720 - 803)

La netrovita amiko Lu Hongjian

Al antaŭurbo hejmon li translokis:
ĝis plantokampo l’ pad’ sovaĝa iras;
ĉe l’ heĝo krizantemoj, kiuj tamen
aŭtune ne disfloras, sin spaliras.
Je pordofrapo, eĉ ne hundo bojas;
mi ĉuas, turniĝinte, al najbaro,
kiu respondas, ke li iris monten,
revenos ofte en krepusk-muaro.

Li Duan (743 782)

Aŭskulto al citro

Antaŭ luksa ĉambro la liuton
tinte sonan l’ jada man’ kondukas.
Por allogi l’ koron de amato
ĉarma, ŝi de temp’ al temp’ misplukas.

Gu Kuang(? - ?)

Plendo de honordamo

Muzikaj sonoj el la luksa turo nubskrapanta
kaj ridoj de haremo kunfandiĝas en zefiro.
Nur gutas klepsidrakvo, ŝi kurtenon supren
levas
por ĉei al la Lakta Vojo en aŭtuna spiro.

Elĉinigis



Minosun (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-DUA

Inteligento vojaĝas en la nordo

§22-09

Brilo demandis Senekziston, dirante:

“Majstro, ĉu vi ekzistas aŭ vi ne ekzistas?”

Senekzisto restis silenta. Ricevinte nenian respondon al sia demando Brilo, anstataŭ fari pluan demandon, serioze ekzamenis per la rigardo la aspekton de Senekzisto kaj trovis, ke tiu estas nur malplena kaj obskura. Tuttage li lin rigardis, kaj povis vidi nenion; li lin aŭskultis, sed povis aŭdi nenion; li lin palpe serĉis, sed tuŝis nenion.

“Tio estas la plej perfekta stato de la ekzistado!” konkludis Brilo. “Kiu do povus atingi tiun ĉi staton! Mi povas ekzisti en neekzisteco, sed ne povas neekzisti en neekzisteco. Se nur mi povus resti neekzistanta en neekzisteco — kio estus ideala! Sed kiel mi povus atingi tian staton de la ekzistado?”

§22-10

La agrafofaristo por la Ministro de Milito jam estis en la aĝo de okdek jaroj, sed li ankoraŭ forĝadis agrafojn de zono sen fari la plej malgrandan eraron en sia laboro. La Ministro de Milito lin demandis:

“Mirinda metiisto vi estas! Ĉu vi estas aparte lerta aŭ dotita per la Taŭo?”

“Mi, via servisto, ĉiam obstine alkroĉiĝas al mia metio,” respondis la agrafofaristo. “En la aĝo de dudek jaroj mi ekamis forĝadon de zonaj agrafoj. Mi ne rigardis, nek plu donis

atenton al io ajn alia, ol agrafoj. Mia lerteco en la forĝado de agrafoj venas de mia neglekto al la aferoj en la aliaj regionoj. Jen kial mi povas resti lerta dum tiel longa tempo. Plie, ekzistas ja la Taŭo, kiu trapenetras ĉion. Kiu estaĵo do ne profitas de ĝi en tiu ĉi mondo?"

§22-11

Ran Qiu, disĉiplo de Konfuceo, demandis sian majstron:

"Ĉu ni povas scii pri tio, kio estis antaŭ ol estiĝis la ĉielo kaj la tero?"

"Jes," respondis Konfuceo. "Tio, kio estis en la pratempo, estis la sama, kiel tio, kio estas en la nuntempo."

Ne ricevinte kontentigan respondon, Ran Qiu sin retiris sen meti pluan demandon.

En la sekva tago, revidante sian majstron, li diris al tiu:

"Hieraŭ mi demandis: 'Ĉu ni povas scii pri tio, kio estis antaŭ ol estiĝis la ĉielo kaj la tero?' kaj vi diris: 'Jes. Tio, kio estis en la pratempo, estis la sama, kiel tio, kio estas en la nuntempo.' Hieraŭ mi pensis, ke mi estas klara pri tio, sed hodiaŭ estas ree en konfuziteco. Ĉu mi povus demandi pri la kialo?"

"Hieraŭ vi estis klara pri tio," diris Konfuceo, "ĉar via interna menso jam perceptis la sencon de mia respondo. Hodiaŭ vi estas en konfuziteco, ĉar vi penas eltrovi tion, kio estas fenomena. Fakte ekzistas nek pasinteco, nek nuntempo, nek komenco, nek fino. Ĉu eblus havi jam filojn kaj nepojn, antaŭ ol vi havas filojn kaj nepojn?"

Ran Qiu ne donis respondon. Kaj Konfuceo daŭrigis:

"Ba! Ne necesas, ke vi respondu. Ni ja ne povas kaŭzi la morton por la vivo; kaj ni ne povas fini la vivon por la morto. Ĉu la vivo kaj la morto sin dependas reciproke? Ili esence estas la sama. Ĉu eksistas io, kio naskiĝis antaŭ ol estiĝis la ĉielo kaj la tero? Tio, kio estigas la estaĵojn, ja ne estas estaĵo, sekve ekzistis nenio antaŭ ol la estaĵoj estiĝis. El la Taŭo venas ĉiuj estaĵoj. Kiam troviĝas la estaĵoj, tiam estas la senfina ciklo de la vivo kaj la morto. Same senfina estas ankaŭ la amo de la saĝulo al la homoj, ĉar la saĝulo prenas la Taŭon kiel la modelon."

§22-12

Yan Hui demandis Konfuceon, dirante:

"Majstro, mi aŭdis, ke vi iam diris: 'Ne adiaŭu ion, nek bonvenigu ion. Ĉu vi povus doni al mi klarigon?"

Konfuceo diris:

"La antikvuloj ŝanĝis sian eksteraĵon, sed ne sian internon. La nuntempuloj ŝanĝas sian internon, sed ne sian ekstaraĵon. Tiuj, kiuj ŝanĝiĝas por adaptiĝi al la ŝanĝiĝoj de la eksteraj estaĵoj, devas esti interne identigitaj kun la Taŭo, kiu estas neŝanĝebla. En kiaj okazoj devas esti ŝanĝiĝoj kaj en kiaj okazoj devas esti neŝanĝiĝoj — en ĉia okazo devas esti limo al la ŝanĝiĝoj.

"Siatempe la reĝo Shiwei havis sian parkon, la Flava Imperiestro sian ĝardenon, la reĝo Shun sian palacon, kaj la reĝo Tang kaj la reĝo Wu siajn ĉambregojn. Eĉ tiaj nobluloj, kiel la konfuceanoj kaj la moistoj, sin atakis reciproke per siaj jesigoj kaj neadoj, por ne paroli pri la nuntempuloj! La saĝuloj vivas inter la estaĵoj de la mondo sen alporti malutilon al ili. Nur tiuj, kiuj ne malutilas al aliaj, povas adiaŭi kaj bonvenigi aliajn.

"La montoj, la arbaroj, la ebenaĵoj — ili ĉiuj alportas al mi ĝojon. Kaj tamen, antaŭ ol pasas la ĝojo, jam sekvas malĝojo. Kiam la malĝojo kaj la ĝojo venas, mi ilin ne povas rezisti; kiam ili min forlasas, mi ilin ne povas reteni. Ho ve! kiel bedaŭrinde estas, ke la homoj en la mondo estas nur la gastejo, kie portempe loĝas la ĝojo kaj la malĝojo. La homoj konas nur tion, kion ili trafis, kaj ne konas tion, kion ili ne trafis. Ili povas plenumi tion, kio estas en ilia povo, kaj ne povas plenumi tion, kio estas super ilia povo. Neniu povas eviti tion, kion ili ne konas, nek tion, kio estas super ilia povo. Ĉu ne estas

malĝojinde, ke homoj penas eviti tion, kio estas neevitebla! La perfekta parolo estas manko de parolo; la perfekta ago estas manko de ago. Do estas supraĵe voli, ke ĉiuj havu egalan sciadon!”



Elĉinigis



Wang Chongfang (Ĉinio)

Ĉineske

Eto (Ĉinio)

Floroj en somero

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Somere
sur kampa tero
pompas buntaj koloroj
de floroj en prospero
en suna helo.

Varmege
ardas la suno
sed okulfrapas floroj
en verdherba brakumo
eĉ sub bak-puno.


En lago
jen lotusfloroj
l’ okulojn kaptas rave
per diversaj koloroj
plaĉaj al koroj.

Sur monto
lekantoj are
svingas sin en ventpelo
tenere ondas mare
brilas ĝisvale.

Sunfloroj
flavas mature
kun ridetantaj vangoj
ludas en vent’ plezure
kapklinas lule.

La pejzaĝ’
de la somero
homojn ravas ebrie
plenigas per espero
kaj sorĉa belo.

Jadranka Miric (Serbio)



Julia somera ondo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Somera
veter’ ardiĝas.
Sufokas tagopartoj.
Tre frue mateniĝas,
longe noktiĝas.

Birdetoj
ombre kaŝis sin.
Ŝvitante sub ĉemizoj
hastas homoj bani sin
ĝis la tagofin’.

Subita
somera pluvo
Birdetoj surstrataj jen
banas laŭ pluvofluo,
en ĉi marĉkuvo!

Vigliĝas
birdetaj flugoj.
Etendiĝas flugiloj!
Jam lertas kolombidoj.
Bruas koncertoj!

Viruso
ferias ĉe ni .
Altiĝis la nombroj de
mortintoj. Atendas ni
vakcinon de SI!

Blanka kadro de kruumita popolo

Noktiĝas.
Ĉielkoloro
tre similas al inko.
Tremanta via koro
pro amdoloro.

Aŭgustaj
pezas memoroj.
Neniam forgesu ni :
de popolo suferoj,
rompitaj koroj!

Surstrate
aŭdiĝas noktaj,
de popolo tiklemaj,
kantetoj kompatigaj.
Pro atakoj raketaj
el aer` faligitaj!

Teneraj
softaj sonetoj
ĉiun animon premas.
Konsolemaj vortetoj
inter ekkrioj!

Kolonoj
de rifuĝintaj
homoj. Jen,fi bombitaj.
Ĵus ekstermitaj!

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarangô xa,xa,a (x=senrima).*

Sero (Ĉinio)

Vento en somero

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Jen
leviĝas vent' kun varmplen'
sub suno
kun iom da prem'.

Ĝi
balaas per sunradi'
la teron
aŭ! kun hurla kri'.

Ĉu
tio ja heroldas, nu,
pluvŝtormon
kun pov' de detru'?

Post
tempeto ĉe venta vost'
alvenas
la pluvega tost'.

Vent'
pelas homojn al tegment'
por ŝirmi
sin de pluva dent'.

Hor'
da forta pluv' sen fervor'
ĉesiĝas,
nur restas vapor'.

Jam
vent' ripozas en lum-ban'
langvore
kiel lud-infan'.

** Deskses-Silabo: ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimarangô a,a,xa (x=senrima)*

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_
Eldonas Redakcio de ***Penseo***
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Retadreso: vejdo@163.com
www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm
_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_